

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 8, Junio–Julio 2018



*Al la tuta mondo:*

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo!*

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

***[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)***

## Enhavo

Paĝo

2. Enhavo.  
Pri Ora Ĵurnalo.
3. Espeporko informas.  
Somardagar i Göteborg – prova en intensivkurs i Esperanto 2018.
4. Esperanto ĉe la Roskilde-festivalo.  
Esperantofestival den 13–19 juli på Esperanto-Gården och Folkets Hus i Lesjöfors, Värmland.  
Somera programo en Grésillon.
5. Valdemar Langlet – forgesita heroo.
6. Paret Langlet.
7. Skandinava Esperanto-kongreso memore al la unua Skandinava kongreso, kiu okazis 1918 en Gotenburgo.
8. La jarkunsido de SEF sur la ŝipo Pearl Seaways, la 11an de majo.
9. Ana Cumbelic Rössum – interparolo sur la ŝipo.
10. Pliaj renkontoj sur la ŝipo.
11. Jens Larsen – ĉiĉeronis nin en Kopenhago.  
El "Finaj vortoj" de Jens Larsen post la ĉiĉeronado.
13. Tri interesaj prelegantoj el Norvegio.
14. En la katedralo Karl Johan en Oslo.  
Debato en la revuo NU (liberala) 24an de majo 2018.
15. GRUK.
16. Norges nationaldag, Syttende Mai, firas  
också på Skansen i Stockholm.
17. Senlime en Kungahälla.  
Kungahälla.  
Oriente ĉe la rivero.
18. Klosterkullen.  
"Konungahælla Ytri".
19. Ragnhildsholmen.  
La trireĝa renkontiĝo.
20. Upupo.  
Vortludo de Monica Eissing.  
Anekdotoj (el 1904).
21. Pentekosto en la preĝejo de Angered.
22. En vnlilig grönskas rika dräkt. Ps. 201.
23. La 100-jara jubileo de la unua landa kunveno de la sameoj.
24. Svenska teckenspråkets dag – La tago de la sveda signolingvo, 14 majo.
25. Gejunuloj el Ukrainio vizitis Goteburgon.
26. "Esperanto – ett påhitt".  
Vad säger de om esperanto på Twitter?
27. Kia estas averaĝa Esperantisto?
28. Kresko – Ora Ĵurnalos motsvarighet i Kroatien.  
Recenzo de "Adam Smith – vivo kaj verko" de Bo Sandelin.
29. Miljöpartiet och esperanto.  
Esperantista verkisto kiel kandidato por la Nobel-Premio pri literaturo?
30. Debato en Göteborgs-Posten la 26an de majo.  
Ĝuu la someron!

## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estas neregula.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, ingeagerd.granat@telia.com. Lingva kontrolo: Birgitta Anevik. Fina paĝaranĝo: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!

*La kovrilbildo: Statuo en Kungälv memore al la trireĝa renkontiĝo – legu pli en p. 19.*



## Espeporoko informas



Dum longa tempo jam estas somera varmo en majo. Sed ankoraŭ restas someraj monatoj. La redaktantoj certe bezonas ferion.

Do, la venonta numero aperos nur en aŭgusto.

Sed kio okazos (kaj okazis) dum la somero?

- ✓ Sabate 2 junio estis Esperanto-sabato en Redbergsskolan je 11h – 14a h. Magnus respondecis pri la programo. Poste ekzerco en grupoj kiel kutime
- ✓ La 6an de junio – la Sveda Nacia tago
- ✓ La 15an de junio je la 17a h: Ora Klubo-kunveno. Bv rigardi la retpaĝon!  
[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)

- ✓ La 22an de junio – la antaŭvespero de Sankta Johano, kvar esperantistoj el Pollando venos. Ili loĝos ĉe Siv
- ✓ La 23an de junio... Eble estos renkonto en Nääs por ĝui la teatraĵon "Somermeszgeedziĝo". Diru al Siv se vi povos veni!
- ✓ La 25an de junio – 29an de junio – Intensa somera kurso en Redbergsskolan
- ✓ La 30an de junio, aŭ la 1an de julio: Ekskurso kune kun la polaj gastoj
- ✓ La 1an de julio – du el la poloj hejmeniros
- ✓ La 2an de julio – la aliaj du el Pollando hejmeniros
- ✓ La 15an de julio Ora Klubo-kunveno ĉe familio Granat
- ✓ La 4an de aŭgusto Esperanto-sabato en Redbergsskolan. Bv rigardi la hejmpaĝon!

## Sommardagar i Göteborg

### – prova en intensivkurs i Esperanto 2018

Plats: Redbergsskolan. Grupper på tre olika nivåer  
Tid: må. 25/6 – fr. 29 juni 2017  
kl. 10–15. Sista dagen gör vi en utflykt och prövar att tala esperanto.

Avgift 100:–/dag = 500:– Pg 436 12–1

Arrangörer: Göteborgs Esperantoförening,  
Esperantolärarnas förbund ILEI och  
Studieförbundet Vuxenskolan.

Läs mer på Esperantoföreningens hemsida:  
[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)

Esperanto-Societo de Gotenburgo  
c/o Andreas Nordström  
tfn: 0762–654209  
e-post: [gbg@esperanto.se](mailto:gbg@esperanto.se)  
Mer info: Siv Burell 070–721 34 79



Anmäl dig till sommarkursen i Göteborg, snarast, så vi kan beräkna hur många lärare som behövs.

Ta med dig en vän, ett barn, ett barnbarn, en granne, för visst är

det bra att ha någon att fortsätta att träna esperanto med efter kursen. Vi vill gärna ha blandade åldrar och gärna blandade nationaliteter. Fyra från Polen kommer att delta.

Ingen tror väl att man lär sig ett språk på fem dagar, men grunderna får du, och redskap att själv studera vidare. Två gånger i månaden har vi esperantoträning under hösten.

Planerar du att åka utomlands hjälper vi dig att hitta esperantister du kan övernatta hos.

Kontakta mig gärna på mail:  
[siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com)

TEAMO "ESPERANTO"  
ĈE LA ROSKILDE-FESTIVALO  
BONVENON!

**Daŭras aliĝoj por 2018**

**Elektu laborteamon ĉi tie / Vælg dine vagter her**

**30/06 – 8/07 2018**



LEGU PLI PRI **LA CELO, LA LOKO, LA DATOJ, LA KONDIĈOJ**, TROVU AMIKOJN SUR LA **LISTO DE ALIĜINTOJ**, KAJ POSTE ALIĜU MEM PER **LA ALIĜILO!**

Legu pli en <https://roskildefestivalo.wordpress.com>

Inga sciigis Ora Ĵurnalo:n pri tiu festivalo. Dankon!

## **Esperantofestival den 13–19 juli på Esperanto-Gården och Folkets Hus i Lesjöfors, Värmland**

– Vi hoppas nå personer i alla åldrar så att de efter vår kulturvecka öppnar sina ögon för esperanto, säger Lennart Svensson, Esperantogården.

Närmaste stad: Filipstad.

Adress: Esperantogården, Stiftelsevägen 1,  
680 96 Lesjöfors.

<https://www.facebook.com/esperantogarden>

Telefon: 0590–309 09

### **Somera programo en Grésillon**

- 2018-julio-09/27 2-a Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj (7+5+6) kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Korĵenevskaja, Mikaelo Bronŝtejn
- 2018-julio-09/16 4-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso
- 2018-julio-15/21 Semajno de ĉiĉeronado en la regiono Anĵuo kun Catherine Kremer
- 2018-julio-16/21 Speciala semajno kun kursoj de Esperanto



- 2018-julio-21/27 30-a Internacia E-Konferenco de OSIEK «Esperanto en Artoj»
- 2018-aŭgusto-11/19 8-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

Aliĝu 2 monatojn antaŭe por ĝui redukon.

Bonvenon!

Esperanto-Kulturdom Greziljono,  
F-49150 Baugé en Anjou

<http://gresillon.org/somero>

## Valdemar Langlet – forgesita heroo

Agneta Emanuelsson kaj Roland Eriksson, ambaŭ el Katrineholm, ĉeestis la Esperanto-Societon, sabaton 5 majo. Agneta kunportis sian libron pri Valdemar Langlet kaj kelkajn lumbildojn, kiujn Roland montris.



Parentezo:

*Kiam Margareta, Ingegerd kaj mi iam sidis sur la trajno de Gotenburgo al Skövde ni renkontis Mikael Engström, parencon de Alex Langlet. Mikael estas redaktanto de la revuo Tillit, kun nur pozitivaj novaĵoj. Biologie, ili ne estis rilataj, sed la avino de Mikael estis adoptita de Alex Langlet kaj kreskis en Spetebyhall. Mikael sciis, ke Valdemar Langlet estis esperantisto, kaj*

La titolo *Valdemar Langlet – forgesita heroo?* finiĝas kun demandosigno. Eble Valdemar Langlet en Svedio estis "en ombro" de Raoul Wallenberg, sed en Hungario, strato kaj lernejo estis nomitaj de li. En Upsalo ni havas la Langlet-parkon. La skribo de Agneta estis publikigita de "Västra Sörmlands Kultur- & Guide-förening". Agneta kaj Roland loĝas en


*kiam li aŭdis la vorton Esperanto, li kontaktis nin. Mikael estis en Budapeŝto plurajn fojojn por serĉi la spurojn de sia parenco.*



Katrineholm kaj ne malproksime estas la bieno Spetebyhall, Lerbo, kie Valdemar naskiĝis en 1872 kiel la plej juna de kvar fratoj. La patro estis arkitekto kaj la patrino verkisto. Ŝi estis unu el la fondintoj de la revuo Idun. La du plej aĝaj fratoj Filip

kaj Abraham fariĝis sciencistoj, la tria, Alex, iĝis artisto.

Kiam ni parolas pri Valdemar ni ne forgesu lian edzinon Nina! Ni startu de la komenco:



## Paret Langlet



Jag citerar fritt från Agnetas skrift:

Valdemar tog studenten i Stockholm som den yngste i sin klass och fortsatte sina studier i Uppsala.... Som 15-åring lärde han

sig Volapük, och då Zamenhofs lärobok (1887) hade översatts till svenska, blev Esperanto en del av hans liv. Tillsammans med några studentkamrater bildade han Sveriges första och Europas andra esperantoklubb 1911. Tillsammans med en rysk esperantist blev han redaktör för esperantorörelsens gemensamma tidning.

Tillsammans med en studentkamrat bestämde Valdemar 1895 att per cykel ge sig ut i världen för att pröva esperanto. De besökte Finland, Ryssland, Turkiet, Österrike och Ungern. Redan året därpå var Valdemar tillbaka i Ungern.

I Odessa, Ryssland, besökte de esperantovännerna Nikolaj Borokovko och hans blivande hustru Antonina, som tog väl hand om de båda studenterna. 1896 födde Antonina dottern Nina, som långt senare (1925) kom att bli Valdemars andra hustru, sedan den första, finska Signe Blomberg, avlidit.

Nina fick en musikutbildning i Sverige. Hon trivdes inte så bra, så paret flyttade till Budapest, där Valdemar 1932 fick ett lektorat i svenska. De blev centrum i ett livligt kultur- och sällskapsliv, där även många judar fanns med bland vännerna. Detta blev säkert avgörande för deras fortsatta liv. En av besökarna 1936 var kronprinsessan Louise, vars besök Valdemar arrangerade. Hon stannade i fem veckor och många andra kom för att hålla konserter och delta i kulturarrangemang, utställningar och annat.



Langlet är bland annat känd som en av de drivande krafterna i den stora räddningsaktion för judar och andra av nazisterna förföljda personer som genomfördes i Ungern under slutet av andra världskriget. När Nazityskland ockuperade Ungern 1944 hade paret Langlet redan bott i landet i över tio år. Valdemar hade översatt ungerska böcker till svenska. Paret hade alltså inga problem med att tala ungerska. Genom sin position som kulturattaché på den svenska legationen i Budapest och som varandes Svenska Röda Korsets delegat i Ungern kunde han tillsammans med sin hustru Nina hjälpa till att rädda tusentals personer från nazisternas förföljelser genom att utställa svenska skyddsdokument och föra flyktingar till hus och kloster som låg under Röda Korsets beskydd. Valdemar och Nina förlorade allt de ägde i Budapest och flyttade till Sverige efter att den sovjetiska armén nått fram till Budapest. Valdemar blev 1944 av prins Carl utsedd till chefsdelegat för Svenska Röda Korset, då Folke Bernadotte inte fick tillstånd av den ungerska regeringen att komma. Hus med Röda Korsets skyltar respekterades för det mesta av nazisterna – men inte alltid. Makarna Langlet stod, efter de s.k. pilkorsarnas maktövertagande i oktober 1944, på "dödslistan". De kom i alla fall lyckligt hem till Sverige, men helt utan pengar. Så småningom fick Valdemar en liten pension av staten som tack för sina insatser. Nina arbetade som pianolärare, men hemmet var fattigt.

Det finns mycket mer att berätta, men jag kan förmedla kontakt med Agneta Emanuelsson, om du vill köpa hennes skrift.  
/Siv Burell

## Skandinava Esperanto-kongreso memore al la unua Skandinava kongreso, kiu okazis 1918 en Gotenburgo



Dank al Ann-Louise Åkerlund kaj la aliaj estraranoj en DEL, NEA kaj SEF ni povis ĝui krosadon inter Kopenhago – Oslo – Kopenhago (aŭ Oslo – Kopenhago –

Oslo) kun ĉiĉeronado en la du ĉefurboj. De Danio venis 19 personoj, de Norvegio 8 kaj de Svedio 19. La 11an de majo estis la sola tago kiam ni ĉiuj estis kune.

Margareta Andersson kaj mi (Siv Burell) venis de Gotenburgo kaj komencis la vojaĝon en Oslo.

Ni ĝuis la interesajn programpunktojn, sed ĉefe ni ĝuis la interparolojn kun antaŭe

nekonataj personoj. Kiam ĉiuj parolis esperanton ni ne pensis ke ja estas personoj de tri diversaj landoj.

Espereble – en ne tro fora estonto – ankaŭ Finnlando kaj Islando estos inkluditaj en Nordia kongreso. Kaj pli estonte ankaŭ la Baltaj landoj. Ŝajnas ke la esperanto-movado en niaj landoj vigliĝos.




*Parto de la 45 kongresanoj antaŭ la foriro de Oslo*



*Post varmega promeno kun pakaĵo de la busterminalo ĝis la urbodomo estis agrable vidi la ĉarman pentraĵon de neĝa pejzaĝo en la urbodomo.*



*Parto de la granda salono.*



*Ŝajnas ke cignoj estas simbolo por la reĝa familio.*



## **La jarkunsido de SEF sur la ŝipo Pearl Seaways, la 11an de majo**



La eksiĝanta prezidanto Olof Pettersson transdonas la martelon al la ĵus elektita nova prezidanto Puff Östling. Olof tamen restas en la estraro, sed kiel ordinara membro. Nova anstataŭanto estos Lotta Lauritz de Luleå.

Do, la SEF-estraro de 2018 konsistas el Puff Östling, Ann-Louise Åkerlund, Olof Pettersson, Arnulf Naif, Yuejin Guo kaj Lotta Lauritz.

Eksterordinara membro kaj respondeca pri informadikaj aferoj: Stella Lindblom.

Post multaj jaroj kiel kasisto de SEF, Anita Dagmarsdotter rezignis. La nova prezidanto Puff dankis ŝin pro treege bona laboro.



Kiu povus preni sur siajn ŝultrojn la kasistajn taskojn – oni ne scias. La elekta komitato (Siv, Martin, Tatu) malsukcesis trovi novan kasiston. Nova elekta komitato estos Siv (kunvokanto), Anita kaj Soile.

Nova tasko por la novelektita estraro estos: Nordia kunlaboro – kaj eble ankaŭ kunlaboro kun la Baltaj landoj.

Ĉar SEF havas rimedojn en la Fonduso por Evoluo, la jarkunsido decidis doni 15 000 kronojn al la Gotenbarga klubo kiel kompenson de la kostoj por la Libro & Biblioteko-Foiro 27–30 septembro 2018.

*Bonvenon al Gotenburgo!*

*Koran dankon por ke la kunsido estis en la sveda, kiel la Gotenburganoj proponis la pasintan jaron! /Siv*



## Ana Cumbelic Rössum – interparolo sur la ŝipo



Ana estas estrarano de Dana Esperanto-Asocio kun preskaŭ la sama nombro da membroj kiel SEF. Dum la kongreso ŝi gvidis nin en kantado lige al la jubilea programo kaj gvidis grupon en Kopenhago.


”Kiom da kongresoj vi ĉeestis – universalajn kaj aliajn?” ”Pli ol 20. Ankaŭ skisemajnoj allogis min. Mia edzo kaj mi estis membroj de la Fervojistaj asocio kaj ni vojaĝis multe”. Ana naskiĝis en Kroatio, sed translokiĝis al Danio ĉar ŝia edzo estis dano.

”Kiom da lingvoj vi regas?” ”La kroatano, esperanton, la italan, francan, germanan kaj danan – sume ses”. Eble ŝi povus nomi sin

poligloto. Poligloto devas regi almenaŭ ses lingvojn.

Historio interesas ŝin, kaj ŝi legas multe. ”Ĉu vi povus rekomendi interesan libron en esperanto?” ”Jes, ’La stokita vino’ de Poul Thorsen kaj Roma Thorsen. Ĝi estas recenzita de la svedo Sten Johansson: *”Poul Thorsen (1915–2006) estas konata kiel plurmaniere aktiva kultura aganto en Esperanto. Li estis poeto, redaktoro, eldonanto, edukanto kaj recenzanto. [.....] La titolo Stokita vino sendube aludas la fakton, ke ĉi-libre aperas tekstoj diverstempaj. Tio estas, ili temas pri diversaj stadioj en la vivo de la aŭtoro, kaj supozeble ili estas ankaŭ verkitaj je malsamaj momentoj. Plimulto estas vojaĝpriskriboj, kutime el lokoj ne oftege vizitataj.”*

Ana kaj ŝia edzo interrilatis kun Marjorie Boulton. Alia interesa persono estas Kaj Rössum, tradukisto de la dana en esperanton. Alia ŝatokupo de Ana estas radio-kvizo, dane kaj esperante.



Jen unu el ŝiaj kantoj, unu kies melodion mi rekonis:

|: Kavaliroj de la Tablo Ronda, ĉu al vi plaĉas blanka vin'? :|

|: Ĉu al vi, jes, jes, jes, ĉu al vi ne, ne ne, ĉu al vi plaĉas blanka vin'? :|

[.....] |: Post la morto mi entombiĝu en la kelo kun bona vin'. :|

|: En la ke-, jes, jes, jes, en la ke- ne, ne, ne, en la kelo kun bona vin'. :|

/ Siv intervjuis

## Pliaj renkontoj sur la ŝipo



Du amikinoj **Anne-Karin Bondhus** el Stavanger kaj **Cécile Anda** el Brune, proksime al Stavanger, rakontis siajn spertojn pri esperanto.

Anne-Karin jam en la gimnazio lernis esperanton. Ŝi havis instruiston, Rolf, kiu mem lernis esperanton, ĉefe per korespondado kun angla lingvisto. Troviĝis ĉirkaŭ 30 gelernantoj en la klaso. Anne-Karin pensas ke nur tri el ili ankoraŭ uzas esperanton.

Cecile estas francino, kiu per siaj gepatroj ofte aŭskultis esperanton. En iu SAT-kongreso ŝi renkontis Rolf – la instruiston de Anne-Karin. Ili geedziĝis kaj translokiĝis al Norvegio. Cécile diris ke ili havis 7 feliĉajn jarojn kune, ĝis li bedaŭrinde forpasis. Nuntempe Cécile pentras kaj havas ekspoziciojn. Temas pri pentraĵoj en oleo, akrilo kaj akvarelo. AnneKarin ŝatas vojaĝi kaj partoprenas ekz. en Kristnaskaj Festenoj en

Germanio. Do, per esperanto Anne-Karin kaj Cécile fariĝis amikinoj.

**Kjell Peder Hoff** prezentis sin dirante ke li venas de la Kardemumma vilaĝo. En la sveda: Folk och rövare i Kamomilla stad, verkita de Thorbjørn Egner. La vera nomo de la komunumo de Kjell Peder estas Rælinge, proksime al Oslo. Tie li laboris en muzeo pri malnovaj metioj kaj ludiloj. Troviĝas 149 familioj en la

”Kardemumma vilaĝo”, sed tute ne la rabistoj Kasper, Jesper kaj Jonatan kiel en la fabelo.

La voĉon de Kjell Peder ni ofte aŭdis. Por ĉiu situacio li havis kanton kaj li bele kantis. La jena origine francan tekston li ekz. kantas:



<https://lyricstranslate.com/en/tous-les-gar%C3%A7ons-et-les-filles-%C4%89iuj-knaboj-kaj-knabinoj.html>

Lastsomere li estis en Seulo. Eble li ankaŭ kantis tie.

Alia interesa persono estas **Liss-Lotte Talbro**, kiu iam trovis esperantan afiŝon en parko. Ŝi telefonis al la kontaktpersono kaj maljunulo respondis. Ŝi fakte ne sciis ĉu vira aŭ virina voĉo. ”Kial vi telefonas al mi?” diris la voĉo. ????? Sed ŝi ricevis alian telefonan numeron kaj ekhavis kontakton kun Britta, instruistino

pri la angla kaj informadiko. Poste Liss-Lotte partoprenis en lundajn studrondojn en sia urbo Odense. Tiam troviĝis tri kluboj, nuntempe neniuj. Por havi okazon paroli

esperanton, ŝi partoprenas en kunvenoj kaj kongresoj diversloke. Verŝajne ŝi estas la sola esperantoparolanta persono en Odense.

## Jens Larsen – ĉiĉeronis nin en Kopenhago



Temas pri lokoj kiuj havas signifon por la esperanto-movado.



En la gvidpromenado de Jens troviĝis la plej junaj kaj la plej maljuna partoprenanto. En alia malpli longa gvidpromeno kun boatveturo partoprenis la aliaj.

**Snorre Benum** el Norvegio havas 94 jarojn, sed dum la longa promeno li ne ŝajnis laca.

**Svend V. Nielsen**, junulo el Århus nur studas esperanton dum du jaroj. Li volonte legas librojn esperante. Ĝis nun li trovis ke la plej interesa libro estas "Mondo de travivaĵoj" de Tibor Sekelj.



Malgraŭ bona streĉo de Ann-Louise okazis ke kelkaj el la partoprenantoj estis perditaj. Jens svingis la flagon en la fronto de la grupo kaj Kjell Peder havis alian flagon en la fino de la grupo. Do, la Kopenhaganoj vidis, ke estas verduloj en la urbo.



## El "Finaj vortoj" de Jens Larsen post la ĉiĉeronado

Ni ne estas aparte fieraj pri tio, sed fakte Danio ludas tute specialan rolon en la historio de la internacia lingvo:

- La unua profesia lingvisto de la mondo, Rasmus Rask, skizis internacian lingvon kiu forte inspiris la unuan socialiston de Danio, Frederik Dreier.
- La elstaraj lingvistoj Vilhelm Thomsen kaj Otto Jespersen publike pledis favore al neŭtrala internacia lingvo.
- Andreas Blinkenberg, profesoro en Århus, preskaŭ sukcesis malhelpi la Unesko-rezolucion favore al Esperanto en 1954.
- Ivo Lapenna, kiu venkis kontraŭ Blinkenberg, havis Danan edzinon kaj



estas entombigita en Rodovre,  
antaŭurbo de Kopenhago.

En Skandinavio Esperanto neniam estis danĝera lingvo – malkiel la Germana kaj la Rusa. [.....] **Nia historia sperto estas ke la Anglalingvaj landoj defendas nin kontraŭ Germana kaj Rusa influo, kaj tial ni amas la Anglan.**

Hodiaŭ la Germana kaj la Rusa ne plu estas tiom minacaj, sed Esperanto ne multe profitas de tio, ĉar ankaŭ la Angla ne estas minaca. Oni ja rajtas esti dulingva. Oni povas uzi la nacian lingvon aŭ dialekton hejme kaj la Anglan aliloke.

**Se oni preferas ke la idealo estu unu lingvo, ankaŭ tio eblas.** Oni simple atendas ke homoj iom post iom tute libervole rezignos pri la naciaj lingvoj favore al la Angla. Ne gravas ĉu oni mem ĝisvivos tion. Ja temas pri idealo, al kiu la socio tute trankvile progresas, paŝon post paŝo.

Kion ni Esperantistoj povas kontraŭdiri al tio?

**Unu ebleco estas insisti ke Esperanto estas multe pli facila ol la Angla.** Tio estas vera, sed bedaŭrinde tio validas nur en la klasĉambro. La praktike plej facilaj lingvoj estas tiuj kiujn oni plej frue lernas kaj plej multe uzas.

Oni povas fari tion kun aliaj lingvoj ol la Angla, sed tion oni devas aparte plani. La facila lernebleco estas punkto favora al Esperanto, sed ĝi ne estas konvinka. Ido kaj Novial povis aserti sin ankoraŭ pli facilaj ol Esperanto, tio ne helpis ilin.

**La alia ebleco estas insisti ke Esperanto rajtas esti malfacila.** Lerni la lingvon mem estas pli facile ol lerni la Anglan, Germanan aŭ Rusan, sed ĉio alia fariĝas pli malfacila.

Antaŭ ol ni disiros, mi volas prezenti al vi tri paradoksojn. Paradoksoj estas malfacilaj – sed se oni komprenas ilin, ili ankaŭ estas instruaj.

**La unua kaj plej grava paradokso estas la jena: en mondo kie ne ekzistas Esperanto, ne povas ekzisti monda lingvoproblemo.** Problemo laŭdifine havas solvon – kaj se ne estas solvo, la problemo ne estas problemo, sed io kion oni simple devas toleri. Kiel la morton kaj la impostojn, ekzemple.

Tamen, ja ekzistas Esperanto, do ankaŭ ekzistas la monda lingvoproblemo.

Kio do malhelpas la solvon efektivigi, kaj kial homoj kredas ke la problemo jam estas solvita per la Angla?

La respondo estas ke en Anglalingvaj landoj oni ne nur rifuzas kredi ke ekzistas monda lingvoproblemo kiun povas solvi Esperanto – **oni rifuzas kredi ke ekzistas nacia lingvoproblemo kiun solvas la Angla!** Tio estas la dua paradokso.

La Angla ne estas oficiala lingvo de Britio aŭ Usono. Tiam logike ne povas ekzisti Angla lingvopolitiko, kaj eĉ malpli povas ekzisti internacia lingvopolitiko favore al la Angla. En Usono eĉ ne povas ekzisti kultura politiko, ĉar ĝi ne havas kulturen ministerion. Kaj se ne ekzistas Usona kultura politiko, kiel do povas ekzisti Usona kultura imperiismo?

Kompreneble, eĉ se la Angla ne jure estas la lingvo de Britio kaj Usono, ĝi ja fakte estas tia. Kaj se ne ekzistas kultura ministerio, tio signifas nur ke la kultura politiko, imperiisma aŭ ne, realiĝas kiel konsekvenco de aliaj politikoj. Sed lingvo kaj kulturo neniam aperas kiel apartaj politikaj kampoj en la debato. Tio metas dikan vualon sur la tutan temaron, kaj iĝas tre malfacile pensi klare pri ĝi.

**Fine, la tria paradokso.**

**En Skandinavio oni devas aparte plani, se oni volas akiri bonan scion de alia dua lingvo ol la Angla.** En la Anglalingvaj landoj oni devas aparte plani se oni volas lertiĝi pri iu ajn dua lingvo. **Kiu do estas en la pli bona situacio: la**

Skandinavoj kiuj facile akiras la Anglan, aŭ la Usonanoj kiuj malfacile akiras iun ajn duan lingvon?

La respondo dependas de tio ĉu la idealo estas unulingvismo aŭ plurlingvismo.

Se plurlingvismo estas la idealo, ni havas paradokson: la viktimoj de tiu esprimo de lingva imperiismo estas la Usonanoj (kaj la aliaj denaskaj Anglalingvuloj)!

La Skandinavoj ne lernu Esperanton por eviti la Anglan. Ili eĉ ne lernu ĝin por akiri kontaktojn ekster la Anglalingvaj landoj. Ili antaŭ ĉio lernu ĝin por kuraĝigi la Usonanojn lerni Esperanton.

Mi opinias ke se Esperanto rajtas esti malfacila, tiam ĝi fariĝas ankaŭ multe pli interesa. Kion vi opinias? /Jens

**Reagoj! Ĉu vi samopinias kun Jens? Ĉu vi pensas alimaniere? Skribu! Debatu!** /Siv

## Tri interesaj prelegantoj el Norvegio

*Mi bedaŭras ke tiuj personoj, kiuj finis sian vojaĝon en Kopenhago, ne havis la eblecon aŭskulti. (La fotojn mi prenis el Interreto.) /Siv*



**Mario Machlik** el Tromsø, origine el Slovenio, muzikisto, ŝakludisto kaj gvidisto de arta agado en Tromsø kaj kompreneble ankaŭ la prezidanto de la Esperanto Asocio de Tromsø.

Li rakontis pri vojaĝo al Japanio kaj montris bildon de la impona *Japana Esperanta Instituto*. Ni ankaŭ rimarkis ŝildon kun la vorto *SOJO – Esperanto-Vegana Kafejo*. En la centro de Tokio estas *Oomota gastejo*. Li ankaŭ menciis ke en Ĉinio dek personoj estas ŝtate pagataj por labori pri esperanto.



**Otto Prytz**, instruis la hispanan en la Universitato de Oslo 1978 – 2005 kiam li emeritiĝis. Li estis dum multaj jaroj estrarano de Norvega Esperantista Ligo kaj

membro de la Akademio de Esperanto.

Li estas brajlo-specialisto, kiu okupiĝas ankaŭ pri esperanta blindulskribo,

Li prelegis pri Johan Falkberger, verkisto el Berlino, kiu skribis pri homoj en la minista industrio de Røros. La voĉo de Otto estas la plej klara kiun mi iam aŭdis, kaj mi komprenis ĉiun vorton – sed mi forgesis noti la enhavon kaj do pli studis la voĉon kaj la spertan regon de la brajlan notojn.

Poste mi ŝanĝis kelkajn vortojn kun li – sed bedaŭrinde faris tre grandajn erarojn. 1. Mi ne alparolis lin per sia nomo – li ja ne povis scii ĉu mi parolas al li ĉar li ne vidis min. 2) mi ne prezentis min antaŭ ol mi alparolis lin. 3) Mi ne diris kiam mi forlasis la ĉambron kaj li ja riskus paroli "al la aero". Hmmm ---- se mi havus alian okazon renkonti lin, mi vere ne eraru tiel grave! Mi promesas!

**Herman Ranes**. Li estas universitata lektoro en Trondheim – "Institutt for elektroniske system. Fakultet for informasjonsteknologi og elektroteknikk".



*Bildo simila, sed mi memoras lin en ruĝa kvadratita ĉemizo – ne en blua.*

Kompreneble li koncentris sin sur la altnivela tekniko en Seulo, kie li partoprenis la UK-on pasintan someron.

Mi ne sciis ke en Sudkoreujo troviĝas la kvara plej granda aŭtofabriko de la mondo. (URSA 4). Ankaŭ tre granda estas la kresko de varmeko, pli granda ol tiu de aliaj landoj. Do,

oni bezonas glaciaĵon – eĉ se ĝi enhavas fazeolojn.

La pejzaĝo estas ĉefe formita el lafo kaj la domoj koncentriĝas al la valoj.

## En la katedralo Karl Johan en Oslo



Margareta kaj mi havis tempon antaŭ ol hejmeniri per Flixbuss. Ni ĉeestis diservon. Estis virina pastro, bele vestita, kiu eniris kune kun la ĥoro laŭlonge de la trairejo.

La pastro unue bonvenigis ĉiujn en la angla kaj poste diris la saman norvege. En la himnaro la Patro nia kaj la Kredkonfeso estas skribitaj en *bokmålet*, *nynorsk*, *kvænska*, en la nordsamea kaj sudsamea.

Post la diservo mi iomete parolis kun la virina pastro. Mi miris ke ŝi citis parton de la gnostikaj evangelioj. Ĉu vere ili estis akceptitaj de la norvega eklezio? Ŝi ne klare respondis, sed kunsentis, ke virinoj ĉiam

havis grandajn rolojn en la religio, sed estis neglektitaj de la "patroj de la eklezio".

Bronza leono estis bona sidloko post longa promeno. Margareta kaj mi bone hejmeniris post tre interesaj tagoj!

Ni certe daŭrigos la kontakton kun kelkaj novaj amikoj. Eble la danoj kaj norvegoj legos niajn novaĵojn en Ora Ĵurnalo:n kaj espereble kontribuos per propraj artikoloj! /Siv



## Debato en la revuo NU (liberala) 24an de majo 2018

### Temo: Nordio

Nordio havas longan komunan historion. La landoj estas pli similaj ol la EU-landoj.

Nordia Unio?

La Nordiaj landoj kune havas unu el la 10–12 plej grandajn ekonomiojn en la mondo. En EU

Nordia Unio estus inter la 3–4 plej gravaj membroj.

La Nordiaj landoj havas la plej liberan komerc- kaj medipolitikon en EU, sed kiam ni ĉiu aparte voĉdonas, la voĉoj ne estas sufiĉe fortaj – sed kune!!!!





”Gruk är en kort aforistisk dikt, uppfunnen på 30-talet av den danske poeten och vetenskapsmannen Piet Hein”, läser jag på Internet. Han skrev över 7000 fram till sin död 1996. Dikterna innehåller ofta ironi eller satir.

På 70-talet, då jag var ledamot i Vänortskommittén i Lerums kommun, hade jag kontakt med vänorten Nibe på Jylland. Det var brevväxling och ömsesidiga besök mellan skolor. I något sammanhang fick jag en bok med dikter av Piet Hein. Kanske måste man vara dansk för att riktigt förstå dikterna, men jag läste dem med förtjusning. /Siv

#### ĜUSTA TEMPO

Kiam estas 11 la horo,  
En Usono nur estas je kvin',  
10 Londono, 17 Singaporo  
kaj 13 en la Moskva Kremlin'.

Ĉu ni perdis nian identecon en Nordia Unio? Rigardu Svislandon! Malgraŭ ke la kantonoj estis ligitaj dum centoj da jaroj, ĉiu kantono konservas sian propran identecon.

La finnaj kaj islandaj lingvoj ne estus problemo, se ni nur uzu esperanton ☺.

La lasta frazo ne devenas de la revuo NU sed de mi. /Siv

P.S Ĉu vi scias ke Robert Hannah (L) proponis al la sveda parlamento akcepti esperanton kiel gimnazian fakon kaj starigi universitatan edukon por instruistoj? Ni ankoraŭ ne scias la rezulton.....sed mi dubas ☹.

P.S. 2: Lars Björk faris la bildon. Laŭ mi li estas tre talenta ilustristo!

## GRUK

Ĉu ne estas la dana popolo  
Pli benita ol ĉiuj sub suno,  
Ĉar naskita en lando kun horo  
Je 11 montranta 11?

#### PEDAGOGIA GRUKO

Kiu ŝercon ŝerce prenas  
Kaj severon nur serioze,  
Tiu fakte malkomprenas  
Ambaŭ grandioze.

#### ARTO DE KORESPONDADO

Homoj duspecaj  
Faras blokadon  
Malebligante  
Korespondadon  
Unu principe  
Reagon ne montras,  
Kaj la alia  
Tro tuje respondas.

## TINEA PANTOMIMO

Eble tineoj erare konkludas:  
Homoj respektas nin laŭde,  
Ĉar ekvidante tineon salutas  
Ili per manoj aplaŭde.

## NI MONDCENTRO

Mi estas l'Universa mezo –  
Logiko tion ne kontraŭas.  
Subtenas al la hipotezo,  
Ke la cetero min ĉirkaŭas.

## ETA FABLETO

Akrido ploregis sur ŝtona eben'  
aflikta ĝi tordis la cerbon.  
Ĉar la alfabeton ĝi lernis kun pen'  
kaj ĵus trovis tekston sur verda razen'  
"Bonvolu ne treti la herbon!"

*Från Wikipedia:*

Piet Hein, född 16 december 1905 i Köpenhamn, död 17 april 1996 i Middelfart, var en dansk

vetenskapsman, matematiker, filosof, författare och konstnär. Han är i Sverige mest känd för att med superellipsen som grund tillsammans med



den svenske arkitekten David Helldén ha formgivit Sergels torg i Stockholm.

Hein studerade filosofi och teoretisk fysik vid Köpenhamns universitet, Niels Bohr-institutet och den polytekniska högskolan. Dessutom studerade han vid privata konstskolor och konsthögskolan i Stockholm.

Som författare blev han berömd för sina grugar, en form av små korta dikter med vardagsfilosofisk vers och resonerande form. Han skrev under signaturen Kumbel Kumbell.

Piet Hein och den svenske möbelarkitekten Bruno Mathsson utformade tillsammans det revolutionerande spännbenet som bl.a. används på det klassiska bordet superellips.

1942 uppfann Hein spelet Hex.



## Norges nationaldag, Syttende Mai, firas också på Skansen i Stockholm

Norges nationaldag – Syttende mai – firas storstiltat inte bara i Norge utan även i Stockholm där man samlas och tågar genom centrum till Skansen. Här firas nationaldagen med program på Sollidenscenen och aktiviteter för barn och vuxna på området. Deltagare i festtåget har fri entré via Hasselbacksporten.

Norges nationaldag har sin grund i att kung Christian Frederik undertecknade landets grundlag 17 maj 1814 och det inledde en kort period av självständighet för Norge innan unionen med Sverige som kom till stånd samma år. Den 26 oktober 1905 upplöstes unionen och sen dess firar Norge

sin nationaldag med pompa och ståt, 17 maj-tåg och Ja, vi elsker dette landet.

Barntåg den 17 maj har varit en tradition i Norge sedan mitten av 1800-talet. Barntågen består av marscherande musikkåror och festklädda barn som viftar med norska flaggor.

Varje år går det flera tusen 17 maj-tåg genom Norge av olika storlek, från mindre tåg i byarna till det tåg som går genom Oslo med

tiotusentals personer. Det går också tåg i norska miljöer i utlandet. Barntågen följer speciella rutter och är organiserade så att barnen går klassvis bakom standar. Oslo-tåget går bland annat förbi slottet där norska kungafamiljen står och vinkar på balkongen. Flera traditionella sånger sjungs den 17 maj, bland annat nationalsången Ja, vi elsker dette landet och det som för många normän blivit en andra inofficiell nationalsång Rødt, hvitt og blått. (från Internet)



Sur jena kampo iam situs Kungahälla.



## Senlime en Kungahälla

### Kungahälla

– mitoplena regiono.

Streĉaj pensoj, kiuj stimulas la fantazion aperas, kiam mi iras sub la altaj, frusomere susurantaj kaj helverdaj arbarkronoj. Mi legis ke Sigurd Jorsalafar kunprenis lignan spliton de la kruco de sia pilgrimado al Jerusalemo. Ĝi estas gardita en kesteto kiun la dana reĝo Erik Einmune donis al li.

Mi imagas ke mi, en la jaro 1130, troviĝus sur norvega tero. La grandaj norvegaj urboj estis Oslo, Sarpsborg, Tönsberg, Bergen, Trondheim kaj Kongahälla laŭ fidinda angla historia verkisto.

Unu el la ŝildoj sur la monaĥejo diras:

### Oriente ĉe la rivero

Antaŭ mil jaroj la akvo altiĝis ĉirkaŭ du metrojn pli alte ol hodiaŭ kaj *Göta Älv* disvastiĝis longe sur la ebenaj strandoj. Estis la plej potenca rivero en Skandinavio. Ĝi simple nomiĝis *Älven* (La rivero) kaj frue ĝi estis grava komerca pasejo.

La vikinga epoko malfortiĝis. Nordio renkontis maltrankvilan mezepokon. Reĝoj kaj tribestroj serĉis povon kaj movigis siajn armeojn. La regnoj Norvegio, Svedio kaj Danio ekestis. Ĉi tie, oriente ĉe la rivero, kiun oni sciis per la malnovaj norvegaj sagaoj, la tri reĝoj renkontiĝis. La suda parto de Norvegio ampleksis grandan areon de la nuna Hisingen, kaj renkontis tie la potencan Danion.



La vojoj de la svedoj en la mondon estis limigitaj. Ilia havenurbo okcidente estis Lödöse pli fore, sed ĉe la rivero.

Ili decideme laboris por havi eliron al la maro. Tial ne estas hazardo ke la plej granda parto de la mezepokaj kasteloj en la nuna Vestrogotio estis konstruitaj apud *Älven*. Unu el ili situis sur Ragnhildsholmen.

La suda riversulko estis malprofunda kaj krome ŝtopita de terglito ĉe la loko kiun oni nomas *Jordfallet*. La *Nordre Älv* estis pordego inter Vestrogotio kaj la kontinento.

Kungahälla fariĝis la sesa urbo de Norvegio kaj dum la dekdua jarcento la plej grava.

Sed komence de la dekkvara jarcento la potenco de Kungahälla malkreskis. Meze de la dektria jarcento la



*La monaĥeja altaĵo.*

svedoj estis ricevintaj sian ŝatatan koridoron al la maro per la suda riversulko. 1308 la norvegoj komencis konstrui Bohus Kastelo (Bohus fästning) en pli strategia loko kie ambaŭ elfluoj povis esti kontrolataj.

En la jaro 1476 Lödöse estis anstataŭita de Nylöse. En la deksepa jarcento la urbo Gotenburgo estis fondita.

### **Klosterkullen**

– la monaĥeja altaĵo.

En la jaro 1111 la norvega reĝo Sigurd revenis de sia vojaĝo al Jerusalemo. Li ricevis la nomon "Jorsalafar" (pilgrimado al Jerusalemo) kaj post la hejmeniro li komencis konstrui la urbon "Kongahälla". "La reĝo Sigurd fortigis kaj favoris la komercan urbon, tiel ke ĝi fariĝis la plej altranga urbo en Norvegio kaj li estis la gardanto de la limo de la regno," kion oni scias per la sagao de

Sigurd Jorsalafar. Ĉi tie sur la altaĵo li konstruigis grandan citadelan turon kun ringfortikaĵo. Ĉiuj en la ĉirkaŭaĵo dum pli ol naŭ jaroj estis devigitaj ĉiun naŭan monaton liveri kvin ŝtonojn aŭ kvin stangojn al la palisaro. Ene li konstruigis reĝan bienon kaj preĝejon kaj tie oni gardis la grandan trezoron, la spliton el la kruco de Jesuo, kiun Sigurd kunprenis de la sankta lando. Verŝajne la relikvo malaperis en la flamoj kiam la marrabistoj el la Balta Maro ekstermis la citadelan turon en 1135.

La fundamentaj ŝtonoj kiujn vi trovas hodiaŭ

sur la altaĵo estas la restaĵoj de monaĥejo de la Augustina ordeno. Ĝi estis finkonstruita antaŭ 1180 kaj estas la plej konata monaĥejo en Bohuslando. Monaĥoj nomis sin "Augustinaj

ĥorsinjoroj". Ili devenis de la plej alta socia klaso, portis pastran veston kaj pasigis la tagojn per libroeduko kaj flegado de la animoj. Monaĥejo de simila ordeno troviĝis en Dragsmark, Bohuslando. Je prifosadoj en la maldika tertavolo oni trovis bestoostojn, argilajn pecojn, torĉtenilojn, ŝlosilojn, fiŝhokojn, kombilojn, tondilojn, bukojn, ŝpinbastonajn radetojn, tranĉilojn, kvindekojn da skeletoj de monaĥoj, kiuj estis entombigitaj sub la preĝeplanko malgraŭ ke estis nur duona metro suben ĝis la rokgrundo.

### **"Konungahälla Ytri"**

– aŭ la malnova preĝejo de Ytterby.

Tre stranga ŝtono estas enmasonita en la nordokcidenta angulo de la





*Modelo de la kastelo sur Ragnhildsholmen.*

Ytterby preĝeja ruino. Du vizaĝoj, Sankta Olof kaj Sankta Hallvard.

Olof konstruigis la preĝejon kaj Hallvard estis ĝia protektanta sanktulo.

Ĉu Sankta Olof vere konstruigis la preĝejon? Pri tio kverelas la sciencistoj ĉar la preĝejo konstruiĝis en la dekdua jarcento. Hallvard tamen ne estis pridubita ĉar li estis la protektanto de la urbo Oslo kaj la tuta diocezo, tiu estas la tuta Bohuslando. Unu el la rakontoj pri la ŝtono diras ke la mondo pereus kiam la ŝtono kun la du vizaĝoj malleviĝus sub la terfacon.

### **Ragnhildsholmen**

– iam regocentro.

Ragnhildsholmen situas sur la suda strando de Nordre Älv, Hisingen, en la komunumo de Gotenburgo.

Ĉi tie ankaŭ situas la runoj de la kastelo de la dektria jarcento kiu defendus la komercan urbon Kungahälla en la lima tereno inter Norvegio, Svedio kaj Danio. La urbo sterniĝis kie nun situas la Kastellegården.

Entreprenema farmisto de ĉi tiu bieno kunportis ŝtonojn de la kastelo kaj per ili konstruis terpomkelon. Tie oni hodiaŭ povas legi latinajn dekretojn diversloke.

### **La trireĝa renkontiĝo**

– Svedio, Norvegio, Danio.

Interne de niaj landlimoj proksime kaj al Kungahälla kaj al Lödöse la trireĝa renkontiĝo okazis laŭ la nordiaj sagaoj. La Heimskringla de Snorre Sturlasson asertis ke la loko estis "ved Konhelle i älv". La vorto "landlimo" povas signifi kaj limo kaj aparta orientilo.

Kiuj do estis tiuj kiuj renkontiĝis tiam en la jaro 1101, ie en la proksimeco de la limo inter Norvegio, Svedio kaj Danio?

Mirinda ekskurscelo!

Kunprenu provianton, fantazion kaj bonan humoron!



Povus esti Magnus (nudpieda) Olavsson de Norvegio, Inge la maljuna de Svedio kaj Erik Eidgod de Danio kaj mi ne povas cerbumi pri kio ili parolis. Ĉiuokaze Margaretha, la filino de Inge la maljuna, edziniĝis al la norvega Magnus Nudpiedo. Tiam kaj poste ŝi ricevis la nomon "Fredkulla" (Pacvirino) kiel kromnomon. Tiel oni povas konkludi ke la "amo" devas roli kiam tri landoj renkontiĝas por antaŭenigi la pacpenson. / Ingegerd

## Upupo


– Upupa epops.

La tre bela upupo havas tipan plumaron kun agrablega koloro.

Ĝiaj koloroj estas nigra, blanka kaj oranĝa. La upupo pezas 47–89 gramojn kaj longas je 28 centimetroj kaj la longeco de etenditaj flugiloj estas 44–46 centimetrojn.

Kiam ĝi ekscitiĝas ĝi levas sian grandan plumon sur la kapo.

Upupo havas la famon aŭguri militiron kaj militon, tial estis bona okazo kiam la upupo bone sukcesis kovi idojn en 2017 ĉe la



Ravlunda paftereno. Du flugkuraj idoj en 2017 estis la rezulto.

Ĉu la upupo vere estas militfreneza? Ĉu, vere...? / Ingegerd

## Vortludo de Monica Eissing



Kiuj svedaj urboj kaŝiĝas malantaŭ jenaj esperantaj nomoj?

Divenu!

- 1) Aro
- 2) Krono de lando
- 3) Sanovilaĝomonto
- 4) Riverogolo

- 5) Kreskilago
- 6) Insuleto de Anĝelo
- 7) Nazolago
- 8) Nova Ponto
- 9) Insulo de bestoj
- 10) Domomuelejo
- 11) Kalsoneto
- 12) Saĝa vilaĝo
- 13) Sciilando
- 14) Oeroponto
- 15) Tineofraŭlino aŭ Silurofraŭlino

La solvoj troviĝas en paĝo 28 !

## Anekdoto

SENVUALIGITA – La barbiro: "Kion? Ĉu vi volas forigi vian belan plenbarbon?"

La kliento: "Jes, kaj ankaŭ la lipharojn, sed

rapidu!"

La barbiro: "Per kiu trajno vi foriros, sinjoro kasisto?"



## Pentekosto en la preĝejo de Angered



La Gotenbarga Esperanto-Societo estis invitita al la diservo la 20:an de majo je 11:00 h. por prezenti la lingvon Esperanto kaj legi la pentekostan tekston en esperanto. La diservo temis pri lingva kompreno en la tuta mondo. Paco inter ĉiuj landoj kaj homoj per lingvo-kompreno. Esperanto estas la granda ebleco.

### La agoj de la apostoloj

#### Ĉapitro 2.

Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unu-anime en unu loko.

Kaj subite venis el la ĉielo sono, kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon kie ili sidis.

Kaj al ili aperis dis-irantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidigis sur ĉiun el ili.

Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la Spirito donis al ili parolpovon.

Kaj en Jerusalemo tiam loĝis piaj Judoj el ĉiu nacio sub la ĉielo.

Kaj kiam aŭdiĝis tiu sono, la homamaso kunvenis kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto.

Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al alia:

Rigardu! ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj?

Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis?


Partoj kaj Medoj kaj Elamanoj, kaj loĝantoj en Mezopotamio, Judujo, Kapadokio, Ponto kaj Azio.....

Frigio kaj Pamfilio, Egiptujo kaj la partoj de Libio apud Kireno, kaj pas-loĝantaj Romanoj, Judoj kaj prozelitoj.....

Kretanoj kaj Araboj – ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj.... la mirindaĵojn de Dio.




*Siv kaj Ingegerd legis la Agojn de la Apostoloj, ĉapitro 2, versoj 1–11*



476

1. En vän - lig grön - skas ri - ka  
 Nu sme - ker vin - dens ljum - ma  
 dräkt Harsmyc - kat dal och än - gar. Och  
 fläkt De fag - ra ör - te - sän - gar,  
 so - lens ljus Och lun - dens sus Och vå - gens  
 sorl bland vi - den För - kun - na som - mar - ti - den.



## En vänlig grönskas rika dräkt. Ps. 201

Musik: W. Åhlén  
 Text: C D af Wirsén

En vänlig grönskas rika dräkt  
 har smyckat dal och ängar.  
 Nu smeker vindens ljunga fläkt  
 de fagra örtesängar,  
 och solens ljus  
 och lundens sus  
 och vågens sorl bland viden  
 förkunna sommartiden.

Sin lycka och sin sommarro  
 de yra fåglar prisa:  
 ur skogens snår,  
 ur stilla bo  
 framklinga deras visa.  
 En hymn går opp  
 av fröjd och hopp  
 från deras glada kväden,  
 från blommorna och träden.

**Verdaĵ' amika en vestet'. Himno 201**

Muziko: W. Åhlén  
 Vortoj: CV.D. af Wirsén  
 Traduko: Lars Forsman

Verdaĵ' amika en vestet'  
 ornamis valherbejojn  
 Karesas nun la dolĉventet'  
 la belajn florajn ejojn  
 kun suna bon'  
 arbita son'  
 kaj ondsusura vento  
 ho, jen somera tempo.

Somerfeliĉo kaj kviet'  
 petola temp' por birdoj  
 el arbdensaĵ'  
 kaj el nestet'  
 sonoras melodioj.  
 Esperhymnad'  
 feliĉkantad'  
 el idaj ĝojaj odoj  
 el arboj kaj el floroj.

## La 100-jara jubileo de la unua landa kunveno de la sameoj

Mi (Siv) estis invitita, ĉar mi dum multaj jaroj estis apogmembro de la Samea Societo.



1–2. La guberniestro de Vestrogotio salutas la 80 gastojn sur la korto de la rezidejo en Gotenburgo.



3. Mi havis eblecon iomete praktiki la signolingvon, ĉar mia tablopartnero havis aŭdproblemojn, sed komencis lerni la signolingvon.



4. Johannes Marainen rakontis pri la signifo de la koloroj de la samea flago – la naturo – blua kaj verda, la suno – flava, la fajro – ruĝa. La ringo signifas la spiriton kaj la koneksojn inter la sameoj.



5. Sven Gunnar Hurri, la prezidanto de la samea societo.



6. Ĉirkaŭ la rondaj tabloj ni sidis bone, sed la sonnivelo estis alta.





7. *Magia etoso kiam Elin kantis kaj jojkis (lapona kantmaniero) kaj fakte ankaŭ igis la gastojn kunjojki.*



8. *Anders Danielsson, nia gastiganto, faris la finan paroladon kaj ni ĉiuj iris al la flava salono por la kafo.*

Al Johannes Marainen, Sven-Gunnar Hurri (prezidanto de la samea societo) kaj Anders Danielsson (guberniestro) mi – post mallonga parolo – donis la sepan numeron de Ora

Ĵurnalo, kiu enhavas ok paĝojn pri sameoj kaj Sápmi. Por emfazi la oron de la ĵurnaloj ili havis orajn kovrilojn.

## Svenska teckenspråkets dag – La tago de la sveda signolingvo, 14 majo



Sedan 70-talet har forskning om svenskt teckenspråk pågått. Den 14 maj är **Teckenspråkets dag** för att riksdagen på det datumet, år 1981, erkände teckenspråket som dövas första språk.

Det finns ungefär 160 teckenspråk i världen. I Sverige använder cirka 30 000 döva och hörselskadade teckenspråk för kommunikation, varav...

...cirka 10 000 som modersmål



Teckenspråkssymbolen > Visar var teckenolkad information finns, till exempel på webbådor.



Inte bara med händerna

Teckenspråket uttrycks inte bara med händerna. Hela övre delen av kroppen samt ansiktsuttryck används också.

Det svenska handalfabetet



Lär dig några vardagstecken: [www.sdr.org/teckensprak/vardagstecken-att-kunna-lite](http://www.sdr.org/teckensprak/vardagstecken-att-kunna-lite)

KÄLLA: Sveriges dövas riksförbund, Skolverket, Språkrådet

TT/SVENSKA GRAFIKBYRÅN

(Gabriel de Luleå enmetis la bildtekston.)

Tiun daton en 1981 la sveda parlamento agnoskis la signolingvon la unua lingvo de surduloj.

En la mondo troviĝas ĉirkaŭ 160 diversaj signolingvoj. Ne nur per la manoj, sed ankaŭ per la plej supra parto de la korpo oni faras

frazojn. La esprimoj de la vizaĝo montras ekz. ĉu temas pri aserto aŭ demando.

Kiam 80 personoj parolas samtempe oni bezonus la signolingvon (aŭ TSS). Tiel estis dum la Samea jubileo en la rezidejo en Gotenburgo, kaj mi havis eblecon praktiki kune kun mia tablopartnero. /Siv

## Gejunuloj el Ukrainio vizitis Gotenburgon

Eugenia kaj Anton gastis Inga Johansson, kiu loĝas en la centro de Gotenburgo. Ili alvenis al la flughaveno Landvetter vendrede la 18an de majo. Daŭris antaŭ ol ili sciigis al Ukrainio, ke ili feliĉe atingis Svedion, kaj la patrino de Eŭgenio



serĉis ilin per Fejsbuko. En la hejmo de Inga ili tamen ekhavis kontakton kaj povis trankviligi la patrinon. Survoje al Gotenburgo ili ankaŭ vizitis Pollandon, sed sen renkonti esperantistojn.

Frumatene sabate ili kune kun Inga faris marekskurson al Vrångö. La ŝipveturo daŭras 50 minutojn kaj ili ŝatis la arkipelagon ekster Gotenburgo. Sur la plej alta monteto de la insulo Vrångö situas la pilota gvatnesto, kaj de tie oni havas belegan panoramon.

Ree en Gotenburgo ili sukcesis iri per rapida buso al Stenpiren ĉe Göta Älv, sed trapasi la centron estis komplike. Miloĵ da kurantoj partoprenis la 20-kilometran konkurson kaj neniu buso aŭ tramo trafikis la areon. Do, ili promenadis kaj de la plastika tunelo super vojo ili povis vidi parton de la kurvojo. La varmo estis nekutime alta kaj la kurantoj laŭlonge de la vojo ricevis akvon. Tamen oni la venontan tagon povis legi en Göteborgs-Posten ke 60 personoj kolapsis kaj 27 estis transportitaj al malsanulejoj.

Pli malfrue la paro esploris Gotenburgon kaj nur meznokte revenis al Inga.

Dimanĉe ili vizitis la Mondkulturan muzeon. Ankaŭ Monica kaj Andreas venis tien.

Poste Inga montris al ili la universitaton Humanisten, la Artiston kaj la urban bibliotekon, kie Inga laboris dum multaj jaroj. La Katedralon ili volis vidi, sed ĝi bedaŭrinde estis fermita.

Kiam ili haltis je la vendejo Miksaĵo – kiu ankaŭ estis fermita – la paro donis al ni bonan ideon. Ekster la vendejo estas kesteto por poŝtkartoj. Oni libere povas preni kartojn. Kial ne meti esperantajn poŝtkartojn tien?

Kiam ili promenis en Trädgårdsföreningen kaj ĝuis la kolorojn kaj bonodoron de diversaj floroj – ĉefe rozoj – la sonoriloj de la Katolika preĝejo laŭte sonoris, kaj ili iris al la preĝejo kaj restis tie momenton.

Venis lundon. La buso al la flughaveno kostas multe, sed se oni iras per Flixbus, kies celo estas Upsalo, oni povas eliri en Landvetter kaj savi iom da mono.

Do, Eugenia kaj Anton ne tuj hejmeniris al Ukrainio. Antaŭe ili volis viziti Litovion. Kia interesa vagabonda vivo – aŭ almenaŭ libertempa vivo – ili havas. Feliĉon! /Siv

## ”Esperanto – ett påhitt”

– Inga Johansson reagerar – vi också!

### Mäh, vad är det Pippi säger?

Vovetot dodu vovadod dodedot hohäror bobetotydydoderor? Rövare, alver och Pingu har en sak gemensamt – de talar påhittade språk.


### ”Mi estas la plej forta en la mondo!”

Världens största påhittade språk. Två miljoner människor kan tala esperanto någorlunda bra. Cirka tusen personer har uppfostrats av sina föräldrar på språket.

Den läkare som kom på esperanto i slutet av 1800-talet hoppades att det skulle bli ett världsspråk som människor skulle lära sig vid sidan av sitt huvudspråk. Om vi alla förstod varandra bättre, skulle världen bli fredligare. Tusentals böcker har

översatts till språket, exempelvis ”Pippi Strumpolonga”.

Detta skrevs i Svenska Dagbladet 2016 av Anna Lagerblad.



Tyvänn hittade jag detta först idag 21 maj 2018.

Jag får rysningar av att seriösa journalister fortfarande använder uttrycket ”påhittat” språk när man beskriver esperanto.

Hur kan vi påverka dem och ge riktig information om esperanto, så att de i sin tur kan informera seriöst och kunnigt om esperanto.

Jag vill starta en debatt om detta i vår tidning.

Inga Johansson

**Vi gillar debatter! Skriv din åsikt!**



## Vad säger de om esperanto på Twitter?

### Inga Johansson:

Jag har försökt att samla lite påståenden av olika personer från senaste Twitter-inläggen.

Hoppas du kan engelska för jag översätter inte dessa.

- Also known in #Esperanto as ”malsaluton”. Esperanto loves to use the ”mal-” prefix to make antonyms.
- Wait till they see how one says ”How are you doing?” in Esperanto.
- Esperanto: ”My spelling is phonetic, my grammar is simple and I only have one definite article”.
- I think the time when Esperanto had a chance at becoming a true phenomenon has passed, but then again in this age of the internet and Duolingo it’s never been easier to become an esperantisto.
- So Esperanto is like corba? Everybody heard about it and that it’s complicated and stuff. But nobody knows anybody who ever used it.
- maljes – ”yesn’t” (no)
- Mi pensis, ke ”yesn’t” tradukus kiel ”maljes” kaj mi pravis.
- I can only mumble in Esperanto.
- Almost every time I encounter a new concept in Esperanto it turns out to be simpler than it first appears.



- It puts English, French and German to shame in terms of approachability. Esperanto estas la lingvon de la mondo.
- I think I'm more confident with Esperanto after a month of self-teaching than I ever was with French after 2 years of school. I share the common sentiment that schools could use Esperanto to teach kids how languages work, rather than throw them into the deep end of French etc.
- Saluteton, miaj amikoj! Mi estas Espekun. Mi lernas Esperanto kun vi!

- en la mondo, kie ĉiuj povas skribi poemojn kaj tre facile ami unu la alian, ŝatus mi vivi.
- Mia plej ŝatata kazaĥa frazo estas ekde nun: "Atty atty atty Atty atty atty".\*

\*) [Homo], nomata Atty, rajdante, pafis je ĉevalo [nomata] Atty.

/inga j

Positivt eller inte – huvudsakligen är väl att man talar om esperanto för att förhoppningsvis i framtiden tala på esperanto. /Siv



Trovita Interrete:

De *Roman Mutin*, Nov 29, 2016.

### **Kia estas averaĝa Esperantisto?**

La plej komunaj trajtoj inter esperantistoj.

*Certe, ĉiu persono estas diversa, sed en Esperantujo oni povas trovi multajn homojn, kiuj kundividas la samajn trajtojn. Mi provis priskribi tiujn trajtojn.*

Averaĝa esperantisto loĝas en granda urbo de Eŭropo, Brazilo aŭ Usono. Li estas virseksa blankulo de meza aĝo. Eble ne estas edziniĝinta kaj ne havas infanojn.

Krom sia denaska lingvo kaj Esperanto, parolas almenaŭ unu fremdan lingvon (la anglan, se ne estas lia denaska) kaj studas alian (eble tio ne estas populara lingvo).

Interesiĝas pri lingvoscienco ĝenerale (kaj ŝatas diskuti gramatikaĵojn de Esperanto). Estas senreligiulo. Estas politike maldekstra: Kredas je socia, nacia kaj genra egaleco. Voĉdonus por Bernie Sanders dum la usona elekto.

Subtenas GLAT-raĵtojn aŭ mem estas GLAT-ulo. Subtenas vegetaranismon aŭ mem estas vegetarano. Probable eĉ vegano. Laboras en komputila sfero aŭ studas por labori tie. Subtenas liberan programadon. Eble uzas Linukson. Entute, estas pli "nerda".

Uzas Facebook Twitter, Reddit kaj Telegram por interparoli. Valorigas liberecon kaj privatecon. Eble uzas ĉifradon kiel Proxy aŭ VPN. Bone scias, kiel uzi la akuzativo! (Ha ha!) Kaj fine, estas mojosa.

**Multe por diskuti, ĉu ne? /Siv**

## Kresko – Ora Ĵurnalos motsvarighet i Kroatien

**KRESKO** 5  
2018 aprilo

Kresko är de kroatiska esperantisternas tidning, som motsvarar vår Ora Ĵurnalo

<http://www.esperanto.hr/kresko0418.pdf>

Detta nummer 5 2018 är synnerligen intressant då det innehåller en artikel av

Josip Pleadin, som citeras i den australiensiska Pod-radion 3ZZZ 28/5 samt information om författarinnan Spomenka Štimec.

Mer information från Kroatien hittar ni på <http://www.esperanto.hr>

Väl värt ett besök.

/Inga J

## Recenzo de "Adam Smith – vivo kaj verko" de Bo Sandelin

Bo Sandelin, emerita profesoro pri ekonomiko ĉe la Komerca universitato de Gotenburgo, verkis la 85-paĝan libron *Adam Smith – vivo kaj verko*, eldonita ĉi-jare de Mondial.


La skota filozofa Adam Smith vivis 1723–1790 kaj estas ofte nomata "la patro de la ekonomiko". Li apartenas al la "grandaj viroj" de la epoko de la klerismo, samkiel ekz. Carl von Linné, kaj liaj pensoj havis, kaj havas, grandan influon en la ekonomiaj sistemoj de la okcidentaj ŝtatoj. Lia plej fama verko estas *Wealth of Nations* (Riĉeco de nacioj), sed li ankaŭ, kiel la sciencistoj de tiu epoko, skribis en aliaj disciplinoj, kiel moralfilozofio, lingvoteorio kaj astronomio.

(Pri liaj lingvoteariaj pensoj oni povas legi en la Power-Point-prezentado, kiun Bo faris en la Esperantosabato 3 februari – vidu <http://www.esperanto-gbg.org/smithlingvo/smithlingvo.html> )

Bo faras en sia libro, kiel la titolo jam indikas, skizon de la vivo de Smith, de la verkoj, kiujn li skribis kaj prezentas koncize liajn teoriojn

en diversaj fakoj. Smith estas ofte maljuste atribuita eldiroj kaj opinioj pri ekonomiaj teorioj, kiujn li ne diris, aŭ kiuj estas miskomprenitaj. Bo refutas ilin: Jes, li pledis por libera merkato, sed ne sen reguligoj. Li diris ke la egoismo estas la plej forta potenco en la ekonomia vivo, ĉar ĝi estas neforigebla eco de la homo, sed kun reguligoj ĝi povas beni la tutan socion. Ktp.

La libro de Bo donas legindan enkondukon en la vivo de interesa homo kaj en la disciplino de ekonomiko. Aĉetebla ĉe Adlibris. /Andreas



### Solvo de la vortludo de Monica:

1. Skara 2. Landskrona 3. Sundbyberg 4. Åmål 5. Växjö 6. Ängelholm 7. Nässjö 8. Nybro 9. Djursholm 10. Huskvarna 11. Trosa 12. Visby 13. Vetlanda 14. Örebro 15. Malmö

## Miljöpartiet och esperanto

Ett bidrag från Bertil Nilsson:

Den centrala hemsidan för miljöpartiet har valt att behålla sin beskrivning av partiets mål på esperanto oförändrad. Den beskrivningen är så allmän att det knappast finns skäl för förändring. Att esperantoversionen finns med beror på Gustaf Fridolins positiva intresse för esperanto.

[https://www.mp.se/sites/default/files/mp\\_kortversion\\_partiprogram\\_esperanto.pdf](https://www.mp.se/sites/default/files/mp_kortversion_partiprogram_esperanto.pdf)

Miljöpartiet i Härnösand har utökat och preciserat sin programpresentation på esperanto på sin hemsida. Sannolikt är detta det kommunalpolitiskt aktiva paret Frejarös

förtjänst. Att läsa programmet går utmärkt men om man försöket lyssna på det, upptäcker man att fonogrammet inte är anpassat till esperantos fonologi. Den bristen gäller dock inte bara esperanto.

<https://www.mp.se/harnosand/andra-sprak>

En annan nyhet är att Per Gahrton på nytt inträder i politiken. Han var den av partiets grundare som framförde tanken på att EU borde välja ett officiellt språk för sitt arbete. T. ex. franska, latin eller esperanto.

(Ora Ĵurnalo håller sig neutral i politiska frågor, men vi är öppna för bidrag från olika håll. Samma gäller för följande bidrag. Red.)

## Esperantista verkisto kiel kandidato por la Nobel-Premio pri literaturo?

Bertil Nilsson sendis la jenan artikolon el Heroldo (15 majo 2018).

### Literatura Nobelo: pliaj PEN-centroj kandidatigos

Krom la Esperanta, aliaj PEN-centroj ekpromesas subteni la kandidatecon de esperanto-verkisto al la literatura Nobel-premio. La prezidanto de unu el ili, kiu bone konas la membrojn de la Sveda Akademio, opinias ke "pro la ĵusaj problemoj en tiu akademio maturiĝis la tempo por alispecaj kandidatigoj ol tiuj de la kutimaj antikvaj kulturlingvoj". La promeso estis rekte farita al nia kandidato, c-ano\* Giorgio Silfer.

Efektive la literatura Nobelo preskaŭ neniam estas asignita al verkisto en lingvo sen naciŝtato: esceptis nur la okcitana kun Mistral kaj la jida kun Singer. Ankaŭ neniuj literaturo en indiĝenaj lingvoj ricevis tiun agnoskon. Kial

ne en planita lingvo, por marki turnopunkton? [...]

### C-ano Bertil Nilsson komentarias:

La nuna stato de la Sveda Akademio estas tute malforta. Ne ĉio en la krizo estas publike konata kaj tiu krizo daŭros ankoraŭ longe. La provizora "Konstanta" Ĝenerala Sekretario komunikis, ke en tiu ĉi jaro la Akademio ne donos iun premion, sed dum la venonta jaro ĝi disdonos du. Pri tio tamen ne ekzistas certeco, ĉar la monon por ĉiuj Nobel-premioj disponas La Nobela Fonduso kaj de tiu flanko venis diskreta atentigo, ke nur La Fonduso rajtas decidi, kiu instuticio havos privilegion elekti premiojn. Do nur se la Sveda Akademio regajnos indecon en la prijuĝo de La Fonduso, ĝi ankaŭ estontece elektos premiojn. *(teksto mallongigita)*

\*) = civitano: ano de Esperanta Civito



## Debato en Göteborgs-Posten la 26an de majo

*Debatartikolo de Helena Olofsdotter Stensöta (esploristo je la politika scienco de la universitato de Gotenburgo) kaj Bo Rothstein (profesoro je la sama instituto).*

”Translokigu la aŭtoritatojn, kiuj havas la taskon kontroli aliajn aŭtoritatojn al Gotenburgo. Nun ili troviĝas ĉefe en Stokholmo kaj ne estas bone ke institucioj, kiuj kontrolas aliajn, troviĝas en la sama urbo kiel tiuj, kiuj estas kontrolataj. La geografia



prokcimeco kaŭzas ke la kontrolantoj kaj la kontrolatoj ofte konas unu la aliajn.

Stokholmo havas 12-oble da oficejoj de aŭtoritatoj ol Gotenburgo.

Alia propono: Translokigu la Nobel-Fondaĵon al Gotenburgo. En Stokholmo ja okazis tiom da neŝatataj aferoj.”

*Sur la bildo: Gustavo II Adolfo montras la plej bonan lokon por la institucioj!*

## Ĝuu la someron!

Por la reklamo pri esperanto Inga havas bonan ideon: Kial ne printi poŝtkartojn kun Gotenburgaj temoj kaj doni al turistejoj? Ekzemplo sube.

Printu sur la alia flanko liniojn por la adreso. En aliaj urboj vi povus fari la samon.

Ni kompreneble ankaŭ havas pli pozitivajn bildojn ol droninta ŝipo ☺.

*Feliĉan someron deziras al vi:*

*Ingegerd Granat, Siv Burell,  
Andreas Nordström, Inga  
Johansson kaj Birgitta Anevik*



La ŝipo Göteborg, kiu iris al Ĉinio, en la 18a jarcento.

Saluton de  
Esperanto-Societo de Gotenburgo!  
[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)